

**ELDONANTOJ:**  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).  
W. M. Page, adv., Edinburgh.  
E. Archdeacon, Paris.  
Joan Gilli Noria, Barcelona.  
Teo Jung, Köln (Kolonia).  
G. van Heek, Hengelo.  
Frans Schoofs, Antwerpen.  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).  
—  
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.  
Kun-redaktoro: M. Butin.  
Literatura redaktoro: Zanoni.

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

**ADMINISTREJO:**  
Köln-Horrem, Rejnlando, Germanio.  
Germ. poŝtĉeka konto 70865,  
por Teo Jung, Köln-Horrem.  
—  
Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de l' papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝtmk. Adreau ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

### ABONEJOJ

ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemple aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.  
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrerejo per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

### Aperas semajne.

6 dolaroj, 6 guldenoj, 10 svedaj kronoj, 12 avisaj frankoj, 12 ŝilingoj, 12 danaj aŭ norvegaj kronoj, 12 pesetoj, 20 francaj aŭ belgaj frankoj, 30 litroj, 60 flinaj markoj, 70 ĉsl. kronoj, 250 hung. kronoj, 600 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naĉaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj aliaj ŝtatoj pagu 70 germ. mk., Rusio 12 000 rubl. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, kiuj estas aĉeteblaj ĉe ĉiu banko kaj monŝanĝejo. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finlanta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 15. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronlare 15 mk., aŭ rekte ĉe la administrerejo Köln-Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 1.50 mk.).

### JARABONO:

### Aperas semajne.

### ANONCOJ

costas po cm<sup>2</sup> (kvadratcentimetro) por ĉiuj landoj 2 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCETOJ kostas po 2 foja enpresio kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/2 jarabono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/4 jarabono); 1 foja enpresio kostas la samon kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj de la abonkonto. — Familiaj anoncetoj (naskigo, flandigo ktp.) kaj anoncetoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉefkunso, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

**Numero 62 :-: Edinburgh, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :-: 11. Dez. 1921.**

## La Leipzig-a Foiro.

De D-ro Dietherle,  
direktoro de la Saksa Esperanto-Instituto.

Dufoje en ĉiu jaro, printempe kaj aŭtune, en Leipzig okazas la Specimena Foiro, granda internacia aranĝo, kiun vizitas aĉetantoj el ĉiuj landoj; ili provizas sin ĉi tie por la sekvanta duonjaro je komercaĵoj, kiuj en neniu loko de la mondo estas prezentataj al ili samkvante kaj samdiverse. La Leipzig-a Foiro ne dum mallonga tempo fariĝis tia, kia ĝi estas hodiaŭ. Ekonomia institucio kiel ĝi, kiu evoluis ne forigebla perlo por la internacia komerco kaj ties komercaj-interŝanĝo, kiu konstante alvenigas centmilojn da vizitantoj el la en- kaj eksterlando: ĝi bezonis, por atingi tion, longan tempon, kiu samtempe donis al ĝi internan maturecon kaj firmecon. La Leipzig-a Foiro historie evoluis dum jarcentoj, kaj ankaŭ depost la tempo, kiam el komercaj-vendejoj ĝi fariĝis specimena-ekspozicio, jam pasis kelkaj jardekoj. Sed la ĵus menciita transformiĝo estis la komenco de ĝia moderna evoluo, kaj la Leipzig-a Foiro poste fariĝis unu el la plej gravaj institucioj, ne nur en la germanaj, sed ankaŭ en la eksterlandaj komercaj interrilatoj.

La esenco de la Leipzig-a Specimena Foiro estas jeno: komence de marto kaj fine de aŭgusto en ĉiu jaro la fabrikestoj kaj pogranda-vendistoj de preskaŭ ĉiuj industriaj branĉoj ekspozas dum unu semajno specimenojn de siaj fabrikestoj; kaj la aĉetistoj de la grandaj magazenoj, de la plej gravaj pomalgrandaj vendejoj kaj de la plej eminentaj aĉetunuigoj venas en la sama semajno el la en- kaj eksterlando Leipzig-on, por fari tie ĉi siajn mendojn — mendojn, kies valoro ĉiujare sumiĝas je miliardoj. La vizito de la Foiro estas grandega, kaj precipe post la milito ĝi kreskis neapendite, ne nur sekve de tio, ke la Leipzig-a Foiro nun ree estas alirebla por eksterlandanoj, sed tefe tial, ĉar la ekonomia utilo de ĉi ĉi Foiro en vastaj randoj de la germanaj industrilistaro kaj komercistaro estas nun atentanta multe pli ol antaŭe, ĉar la grandaj perdoj en la milito kaj la premantaj packondiĉoj devigas plene eluzi ĉiujn ekonomiajn aranĝojn, kiuj ŝparigas tempon kaj monon. Kaj tia aranĝo estas la Foiro, en kiu la plej granda negoco povas esti farata per la plej malgrandaj elspezoj, dum la plej mallonga tempo kaj sur la plej malvasta loko.

Ĉio ĉi klarigas la rapidan kreskadon de la Leipzig-a Foiro, kiun plej bone ilustras la ĉiam altiĝanta nombro de la vizitantoj. Printempe 1902 oni notis en la Leipzig-a Foiro 2 659 firmojn, en la lasta antaŭmilita Foiro (printempe 1914) la nombro jam estis 4255. Post komprenebla malaltiĝo en la unuaj jaroj de l' milito, oni notis

aŭtune 1918: 5476 ekspozantojn, kiu nombro poste altiĝis salte printempe 1919: 8325, 1921: pli ol 15 000 da ekspozantoj. Al tiu ĉi rapida kreskado de la nombro de l' ekspozantoj respondis ankaŭ la nombroj de la vizitantoj entute: aŭtune 1915 ĉirkaŭ 18 000, aŭtune 1919 pli ol 118 000, printempe 1921 pli ol 130 000.

La nombro de la ekspozantoj en Leipzig (printempe 1921: 15 000, aŭtune 1921: 15 000) la sumo de la ekspozantoj de ĉiuj aliaj germanaj foiroj atingas eĉ ne de malproksime; ĉar la lasta aŭtuna Foiro (1921) en Frankfurt a. M. havis nur 2862, en Königsberg 2050, en Breslau 1500 ekspozantojn. Tre granda parto de l' vizitantoj de la Leipzig-a Foiro estas eksterlandanoj ekz. printempe 1910: 3198, aŭtune 1918 6451, kaj poste la nombro kreskis konstante kaj atingis printempe 1921 sian plej altan ĝis nun punkton: pli ol 25 000.

La multnombra vizitado de la Leipzig-a Foiro klariĝas, kiam oni konsideras, ke en la Foiro estas reprezentataj ĉiuj artikoloj, kiuj taŭgas por tio, i. e. ĉiuj artikoloj vendeblaj laŭ specimenoj, ĉu ili estas fabrikestoj de la ferindustrio, ĉu la plej malgranda metie fabrikata objekto. Kvankam la listo de la Generala Specimenafoiro nomas nun pli ol 1100 diversajn artikolo-grupojn, tiu de la Teknika Foiro kaj de la Foiro por la Konstrufako preskaŭ 900, tamen en ili tute ne ĉiuj fabrikestoj estas notitaj, kiuj nun efektive estas ekspozitaj en la Leipzig-a Foiro.

La Generala Specimenafoiro havas sian lokon jam de malnovaj tempoj en la urbcentro. Pli ol 60 grandaj foirpalacoj kaj nombro da provizoraj haloj — starigitaj sur la publikaj placoj, por disponigi sufiĉan lokon — enhavas la ekspoziciojn. Tiuj foirpalacoj estas grandegaj konstruaĵoj; multaj el ili havas lokon por miloj da ekspozantoj. Ili estas en la posedo parte de la urbo, parte de privatuloj; laŭ konstrumaniere kaj interna aranĝo ili estas tute alfaritaj al la bezono de la foiruloj kaj donas al la urbcentro tute specialan karakteron, ĉefe dum la foirsemajno, kiam iliaj fasadoj estas kovritaj de sennombraj reklamafiŝoj kaj longaj malsupren pendantaj flagoj. Al tiuj ekspozitaj palacoj verŝajne aliĝos ankoraŭ 30-etaĝa foirturo, kiu laŭ la nuna monkurzo kostos certe pli ol 200 milionojn da markoj. Ĝi havos lokon por pli ol 3000 ekspozantoj kaj enhavos centojn da hotel-ĉambroj. — La Teknika Foiro, la Foiro por Konstrufako, por Ledajoj kaj Higienajoj havas lokon sur la Urba Ekspozita Teritorio, kiujn multaj eksterlandanoj vidis okaze de la Internacia Ekspozicio por la Librometio kaj Grafikaj Artoj en 1914. La ĵus nomitaj branĉoj havas tie grandajn ŝtonajn halojn. Tie nun ankaŭ la konata Essen-a firma Friedrich Krupp A. G. transforminte sian fabrikanon por pacaj artikoloj, konstruis propran ekspozadon.

La uzebla loko por la ekspozicioj de la Leipzig-a Foiro sumiĝas je ĉirkaŭ 250 000 kvadratmetroj, kiun areon aliaj foiroj eĉ ne de malproksime atingas.

### La Leipzig-a Foiro kaj la Eksterlando.

De W. Proffen, Leipzig.

Kiam en la unuaj 1 1/2 jardekoj, de la nuna jarcento la germana regno havis altan politikan pozicion kaj samtempe okazis en ĝi granda ekonomia prospero, tiam ankaŭ la famo de Leipzig kiel internacia foirejo estis nepre fortika. La Leipzig-a Foiro estis la plej granda komerca organizo en la mondo. Ĝia valoro por la ekonomio kaj por la

internacia komercado inter la popoloj estis tiom granda, kiom nur malmultaj aliaj institucioj sur la komerca kampo. Tio estis ekkonebla jam el la nombro de la ekspozantoj kaj aĉetantoj, kiu kreskis konstante, eĉ salte (vidu la desegnaĵon). Ĉi kune ankaŭ la eksterlando pli kaj pli ekkonis la grandan signifon de la Leipzig-a Foiro kiel internacia merkato; kaj ĉiujare en printempo kaj aŭtuno aĉetantoj el ĉiuj landoj de la tero venis kvazaŭ-riverege. Ĉar la germana industrio liveris altkvalitajn produktaĵojn je malaltaj prezoj, tiel ke ankaŭ aĉetantoj el malproksimaj landoj havis profiton malgraŭ la multaj elspezoj. Ankaŭ la urbo Leipzig mem bone konsciis pri sia situacio kiel komerca centro. Jam en la lasta jardeko de l' pasinta jarcento oni konstruis el la urba kaso la „Städtisches Kaufhaus“, kiu kostis 3 milionojn da (oraj) markoj. En 1909 sekvis la „Städtischer Handelshof“ (vidu la bildon), kostinta 7 milionojn da markoj. Samtempe ankaŭ pli ol 20 privataj foirpalacoj estis konstruitaj, kostintaj preskaŭ 100 milionojn da markoj. Ĉio ĉi plifortigis la pozicion de Leipzig kiel centra foirejo; kaj kiam ekz. Berlino provis, tiri al si la Specimenan Foirojn, la ekspozantoj mem kontraŭdiris. Malmulte sukcesis tiam ankaŭ la klopodoj de l' eksterlando, precipe de Anglujo kaj Francujo, kun ŝtata helpo fondi foirojn laŭ la Leipzig-a modelo.

Sed dum la milito kaj en la jaroj post ĝi la foira afero en Germanujo evoluis tiel, ke la eksterlanda komercisto povas esti konfuzata. Jam li scias nur pri la Leipzig-a Foiro; hodiaŭ ekzistas foiroj en kelkaj germanaj urboj. La eksterlando nun demandas sin: Kiun foiron mi vizitu? Ĉar estas kompreneble, ke pro la nunaj interkomunikitaj malfacilaĵoj kaj la altaj vojaĝelspezoj li ne povas iri al ĉiuj foiroj. Eĉ la enlanda komercisto ne povus tial oferi monon kaj tempon; ĉar tiamaniere la profito el la negoco perfoira perdiĝus.

Nu, estas nediskutebla fakto, ke la malnova Leipzig-a Foiro estas nun kiel antaŭe la granda internacia merkato, preferata pro tio, ke dum mallonga tempo sur malvasta loko kunvenas ĉiuj ofertantoj kaj ĉiuj demandantoj. Tion pruvu unue kelkaj nombroj pri la ekspozantoj. La Leipzig-ajn Foirojn vizitis en 1921 printempe 12 600, aŭtune 13 000 ekspozantoj. El ĉiuj germanaj fabrikestoj, kiuj havas intereson por la foiroj, 80% vizitas la Leipzig-ajn Foirojn, 70% vizitas nur ĝin. Oni konsideru ankaŭ, ke ĉe la ekspozantoj en Leipzig oni aĉetas la komercaĵojn senpere ĉe la produktanto mem; ĉar 82% de la ekspozitaj firmoj estas fabrikestoj kaj eldonistoj, 13% estas pogranda-komercistoj (vidu la desegnaĵon).


La grandega kaj rapida kreskado de l' nombro de la ekspozantoj klariĝas el tio, ke la pli ol 100 000 aĉetantoj, kiuj regule vizitas la Leipzig-ajn Foirojn, prezentas grandegan aron da aĉetemaj kaj aĉetopovaj interesuloj. La vendistoj mem malutilas al si, se forrestante de la Foiro, ili ne uzas tian grandiozan vendokazon. Sed per la ekspozado de siaj specimenoj la fabrikestoj kaj pogranda-komercistoj havigas al si mendojn, kiujn alie ili povus ricevi nur per grandaj elspezoj kaj klo-



La Peterstrato dum la Foiro.

podoj. La specimenoj en la Foiro estas antaŭ la okuloj de nur seriozaj interesuloj; la presajoj kaj aliaj reklamiloj venas al la manoj de miloj da foirvizitantoj. La samtempa ĉesto de ekspozantoj el la sama branĉo ankaŭ efikas al ĉiu el ili kiel sprono por fabrikadi pli intense, plifortigi siajn streĉojn; kaj tiel la Foiro mem kunhelpas al pli kaj pli bonaj sukcesoj.


Por eksterlando foiro estas des pli utila, ju pli multbranĉa ĝi estas kaj ju pli komplete prezentigas en ĝi la diversajn industribranĉojn. La eksterlanda komercisto, venanta Germanujon, por komenci komercajn interrilatojn, bezonas okazon, por vidi la tutan, kompletan germanan produktaron. Nur per tio li perfekte ekscias la teknikajn progresojn, la belgustajn novaĵojn kaj novajn aĉetokazojn. Li deziras vidi multon, por ekzameni kaj kompari. Rilate al tio la Leipzig-a Foiro estas unika; ĉar ekzistas nun preskaŭ neniuj komercaj



La Ĉeĥoslovaka Foirdomo.



branĉo, kiu tie ne estas trovata. Ĉi prezentas ĉiujn artikolojn, kiuj laŭ specimeno povas esti liverataj en ĉiu dezirata kvanto, ĉu estas komplika maŝino, ĉu la plej malgranda objekto. Alia instigo por fremduloj, viziti la Leipzig-ajn Foirojn, estas precipe la fakto, ke la germana industrio jam de multaj jaroj serloze penadas, liveri plejble altkvalitajn fabrikestojn. Precipe en la nunaj cirkonstancoj Germanujo devas unuavice eksporiti altvalorajn produktaĵojn, en kiuj sidas granda kvanto da germana laboro. Ju pli malgranda estas en tiu fabrikestoj la valoro de la eksterlanda krudmaterialo — kiu ja devas esti aĉetata en eksterlando per la malaltvalora germana mono — kaj ju pli granda estas la valoro de la laboro en ĝi, des pli profitodona por la germana industrio estas la fabrikestoj; des pli utila ĝi estas por la generala germana ekonomio; ĉar tiamaniere estas malhelpata la foriro de kontanta mono en la eksterlandon.

Plua grava avantaĝo por eksterlandulo, vizitanta la Leipzig-ajn Foirojn, estas la okazo, persone interkonatiĝi kun la fabrikestoj. Estas malnova tradicio de la Leipzig-a Foiro, ke la fabrikestoj persone ĉestu, por intertrakti kun la aĉetantoj. Ĉiuj interuloj forestas. Jen ĉefa ideo de la Leipzig-a Foiro ĝi ne estas nur kunesto de ekspozicio, sed



La urba „Handelshof“ (Komerca Domo).

La partopreno de l'industrio kaj komerco al la Leipzig-a Foiro.



# Nombroj konvinkas.

la regula kunveno de la plej eminentaj komercistaj rondoj el ĉiuj landoj.

Kiel antaŭ milito, ree ankaŭ nun la plej grandaj internaciaj eksport-kaj importfirmoj estas regulaj klientoj en la Leipzig-a Foiro. Kaj la eksterlanduloj ne nur venas por aĉeti; multaj estas ankaŭ ekspozantoj. El kelkaj landoj ilia nombro estas tiom granda, ke ili okupas nun proprajn foirpalacojn. Ekzistas nun jam Aŭstra, Svisa kaj Ĉeĥoslovaka Domo (vidu la bildojn); la konstruo de Sveda domo estas projektita.

Ĝis nun la Leipzig-a Foiro havas la plej altan nombron da eksterlandaj vizitantoj inter ĉiuj germanaj foiroj. En la du lastaj foiroj ekz. ĉeestis ĉ. po 20000 komercistoj. Inter ili estis personoj el ĉiuj eŭropaj ŝtatoj (2000 aŭstroj, 3000 ĉeĥoslovakoj, 2500 holandanoj, 1000 svisoj), sed ankaŭ el Norda kaj Suda Ameriko (ĉ. 500), Afriko, eĉ el Hindujo, Ĉinujo kaj Japanujo.


Eksterlandulo, kiu volas veni al la Leipzig-a Foiro — ĉu kiel ekspozanto, ĉu kiel aĉetanto — trovas en sia lando ekspertojn de la Leipzig-a Foiro, kiuj laboras honorofice. Ili ĉiel helpas al siaj samlandanoj: ili donas informojn pri la vizito al la Foiro kaj estas spertaj eĉ pri la plej malgrandaj detalajoj; ili helpas, por akiri pasportojn kaj por elekti bonan veturilon; ili zorgas por loĝejo en Leipzig. En la urbo mem estas kunvenejoj, aparta por ĉiu nacio (ankaŭ por esperantistoj: Johannplatz 3, I); tie ili trovas dum la tuta tago reprezentantojn de sia lando kaj lingvo, kiuj donas ĉiujn informojn. Tiuj kunvenejoj ekzistas por la vizitantoj el Belgio, Francujo kaj france parolantaj landoj, Aŭstrujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Finnlando, Granda Britujo, Hispanujo, Holando, Hungarujo, Italujo, Norvegujo, Polujo, Portugalujo, Svedujo, Svisujo kaj Usono. Ankaŭ la nombro de l' honoroficaj reprezentantoj de la Leipzig-a Foiro fariĝas pli kaj pli granda. Tiaj reprezentantoj estas nun en jenaj landoj: Anglujo, Argentino, Aŭstrujo, Belgio, Brazilo, Brita Sudafriko, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Ĉinujo, Egiptujo, Danujo, Estonujo, Finnlando, Francujo, Grekujo, Guatemalo, Haiti, Hispanujo, Holando, Holanda Hindujo, Hungarujo, Japanujo, Italujo, Jugoslavujo, Kanado, Kanariaj Insuloj, Kosta Riko, Litovujo, Maroko, Meksiko, Nikarago, Norvegujo, Paragvajo, Peruo, Polujo, Portugalujo, Rumanujo, Rusujo, San Salvadoro, Serbujo, Sudokcidenta Afriko, Svedujo, Svisujo, Urugvajo, Usono, Venezuelo.

El ĉio ĉi oni ekkonas, ke la Leipzig-a Foiro estas tiel organizita, ke eksterlanduloj povu viziti ĝin plej facile kaj ke ili povu restadi en Leipzig plej agrable. Kompreneble tiu ĉi organizacio povis atingi sian nunan perfektecon nur dum evoluo en jardekoj; kaj ĝi estas garantio, ke ankaŭ estontatempe la eksterlanduloj sin turnos unuavice al la foiro malnova, profitiga jam dum jardekoj: al la Leipzig-a Foiro.

## Industri-Kulturo kaj la Leipzig-a Foiro.

De D-ro Jacques Adler, Leipzig.

Spritaĵoj, kiuj filozofe rigardas la modernan vivon, ŝatas diferencigi la kulturon de popolo aŭ epoko de ĝia civilizacio. Kulturo ili nomas la provizojn kaj produktadon de spiritaĵoj; kontraŭe civilizacio estas — laŭ ili — la materia eksteraĵo de nia tempo kaj societo. Oni facile komprenas, ke tiu ĉi severa diferencigo estas ja helpilo, por atingi kulturhistoriajn sciencojn; sed neniel ĝi povas konduki al tio, ke oni rigardu kulturon kaj civilizacion kiel tute malsimilajn objektojn, kiuj ekzistas nedependaj unu de la alia.



La Svisa Foidomo.

Kontraŭe: kulturo kaj civilizacio reciproke estas interne kaj forte interligitaj. Estas unu el la plej gravaj konstatoj de la ekonomioscienco, ke ĉiu spirita, kultura bezono, por esti kontentigata, nepre postulas iun materialan agadon — presadon de libroj, fabrikadon de instrumentoj, konstruadon de teatroj, muzeoj, bibliotekoj — kaj tiel efektas inter la limoj de la civilizacio. Same la filozofoj ankaŭ rimarkas, ke novaĵo en la fako de la civilizacio neniam restas seninflua al la kampo de la kulturo.

Ni antaŭmetas ĉi tiujn pensojn, por havi helpon por la solvo de la problemo: Kiu estas la interrilato de kulturo kaj civilizacio en la moderna societo de la eŭropaj popoloj?

La Industrio havas la taskon, produkti objektojn praktikajn, por homoj destinitajn kaj konvenajn. Jam per tio ĝi estas intime ligita al la celadoj de la kulturo. Kaj tio estas vera ne nur rilate al industrioj, kiuj tute speciale kontentigas bezonojn de kulturuloj (librometilo, fabrikado de muzikinstrumentoj, de ŝton- aŭ metalplastikaj); ne: ĉiu industria produktado, kiu plejble perfekte taŭgas por sia destino, estas bela laŭ certa senco, kaj tial ĝi estas kultura progreso. La homaj celadoj estas trege multispecaj; ili estas ĉiufle dependaj de la karaktero de loko kaj tempo, de klimato kaj sezono, de la konstanta karaktero kaj la nekonstanta sentimento de la popoloj, de politikaj kaj ekonomiaj situacioj. Sekve tiaj industrioj kaj tekniko, kiuj intence celas produkti

nur tion, kio tute speciale taŭgas por iliaj tute malsimilaj klientoj, kreas abundan aron da objektoj, el kiuj oni povas ekkoni precize la tutan vizaĝon de la kulturo en historia epoko.

Plue industriprodukto ne nur informas pri la deziroj kaj bezonoj de la klientoj, sed same ankaŭ pri la originaleco kaj la gusto de sia produktinto. Ĝi levas sin el la ebena de nura utilaĵo al la sfero de kreanta kulturo, se ĝi estas karakteriza tiel por la individuo de l' fabrikinto kiel por la personeco de l' aĉetanto, kaj se ĝi taŭgigis por sia destino per plej bona materialo kaj plej perfekta formo. Precipe tio estas postulata ankaŭ rilate al la teknikaj produktadoj, kiujn kune kreis scienco kaj praktiko, fizikistoj, kemiistoj, inĝenieroj kaj arkitektoj el ĉiuj landoj.

Kiel la internacia komuneco sur la kampoj de la scienco kaj humaneco, tiel ankaŭ la industria kunagado de la eŭropaj ŝtatoj estas nepre ne nur ekonomia kaj financa afero; sed ĝi estas servo, farota al la komuna eŭropa kulturo. Interŝanĝo de komercaĵoj fariĝas tiamaniere helpilo de kultura interkompreno. Tiu ĉi ideo pli kaj pli multe influis la aliformigon de la foiroj dum la lastaj jardekoj. Ĉiu atenta observanto certe rimarkis, kiel precipe en Leipzig la foiroj akomodigis al la penso, ke internacia kultura kaj ekonomia ligo estas necesa.

La Leipzig-a Foiro aliras al kunagado por la komuna eŭropa kulturo ne nur ĉiujn diversajn branĉojn de la modernaj industrioj; sed pli kaj pli ĝi ankaŭ laborigas por tiu ĉi celo ĉiujn naciojn, kiuj intencas montri en apartaj ekspozicioj la specialan karakteron de sia nacia produktaĵo.

En la venonta Generala Foiro (5-11-an de marto 1922) kaj la Teknika Foiro (5-14-an de marto 1922) oni facile povas vidi, kia estas la kultura valoro de la Leipzig-aj foiroj. Objektoj por la ĉiutaga uzado, artistaj ornamaĵoj, maŝinoj, elektroteknikaj artikoloj, ĉio kion Eŭropo bezonas kaj produktas, la tuta esenco kaj materia ekzistado de la eŭropa civilizacio: ĉio ĉi kunvenos kaj prezentos grandiozan aspekton. Kaj estos vere grava kaj interesa tasko, esplori, kiom tiu ĉi civilizacio estas unuflanke la rezultato, aliaflanke la instiganto de unueca eŭropa kulturcelado.



La Ĉefstacidomo en Leipzig.

## La vizitintoj de la Foiro 1914-1921

F = Printempa, H = Aŭtuna Foiro.

## La Esperanto-Fako en la Leipzig-a Foiro.

La Leipzig-a Foiro estas speciale interesa por ni ĉiuj, kiuj propagandas la uzadon de Esperanto por la internaciaj komercaj interrilatoj, ĉar ĝi uzas nian lingvon kaj ĉe la Foiro ekzistas speciala Esperanto-Fako, kiel parto (Komerca Fakoj) de la Foiro. Nia Foiro estis la unua en la mondo, kiu favoris nian aferon, ĉar ĝi jam antaŭ la tempo, kiam la diversaj aliaj foiroj decidis propagandi pere de nia lingvo, eldonis sian „Liston de la komercaj branĉoj“ en Esperanto. (Tiu ĉi listo estas ankoraŭ hodiaŭ senpage havebla.)

Depost la jaro 1920 la Leipzig-a Foiro eldonas Esperanto-prospektojn. Antaŭ nelonge ĝi forsendis la novajn prospektojn por la Printempa Foiro 1922 en 12000 ekzempleroj en ĉiujn landojn de la mondo.

Post kunsido de la Komerca Cambro en Leipzig, komence de la jaro 1921, kiu partoprenis la prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio kaj la direktoro de la Saksa Esperanto-Instituto, la direktoraro de la Leipzig-a Foiro zorgis pri la tuta starigo de la suprenomita Esperanto-Fako. Tiu ĉi institucio ne „staras nur sur la papero“, sed efektive kaj bone funkcias. Per kaj en ĝi vi ricevos en esperanta lingvo informojn pri ĉiuj foiraferoj. Estas nur necese, ke vi, samideanoj, vizitonte kaj vizitante la Foiro, ne preterlasu la okazon, uzi ĝiajn servojn. Veninte Leipzig-on, serĉu interrilatojn kun alilandaj samideanoj en la ejo, kie dum la foirtagoj vi trovos oficiston de la Fakoj Esperanto-Fako, t. e. en la oficiala dumfoira Esperanto-kunveno, Johannplatz 3, I. Vi trovos tie (en la centro de l' urbo) dum la foirtagoj de mateno ĝis vespero ankaŭ magistrat-oficistojn, kiuj parolas Esperanton, kaj aliajn samideanojn, kiuj donos al vi informojn, gvidos vin tra la urbo kaj ĉiel estos pretaj al via servo. Nepre vizitu la kunvenejon! Ju pli granda estos la listo de alilandaj samideanoj, kiuj vizitos ĝin, des pli efke vi konvinkos la ĉi tiean kaj la fremdlandan komercistaron pri la neceseco de internacia mondhelpingvo kaj pri la taŭgeco de nia lingvo. Ne sufiĉas, — por ni! — ke la internaciaj foiroj propagandas per Esperanto, sed vi, kiel foiruloj, devas ankaŭ propagandi Esperanton dum la foiroj kaj subteni tiujn samideanojn, kiuj instigis la foiroficejojn por la peresperanta propagando. Do, vizitante la Leipzig-an Foiro, ne malkaŝu, ke vi estas esperantisto!

D-ro Dietterle.

Petojn pri informoj bonvolu direkti al Messamt für die Mustermessen in Leipzig (Foiroficejo por la Specimenfoiroj en Leipzig)

# La tutmonda komercistaro vizitas la Foiro de Leipzig

# Esperanto kaj la komerca ĉambro en Nürnberg.

Laŭ invito de la komerca ĉambro s-o prof. d-ro Ledermann faris paroladon pri Esperanto, post kiu okazis vigla diskutado pri la laŭgoco de Esperanto. La Esperanto-gruparo nun ricevis jenan leteron de la komerca ĉambro:

"Laŭ la impresoj gajnitaj en la parolado kaj laŭ niaj diskutoj ni povas konfesi, ke ni vigle interesigis pri la Esperanta movado, kaj ke ni konvinkigis ke la Esperanta lingvo ŝajnas taŭga respondi la ekzistantan bezonon je tutmonda lingvo en la interrilatoj de la popoloj.

Rigardante la disvastiĝon, kiun ĉi tiu helplingvo jam trovis dum la ĝisnunaj jaroj ĉe la plejmulto de la popoloj internacie komercantaj, kaj rigardante la facilan lerneblecon de la lingvo, la komerca ĉambro opinias povi rekomendi la uzadon de Esperanto al la komercaj rondoj, kiuj interesigis pri eksporto. Same ĝi salutas la fakton ke la komerca alturneĝo de Nürnberg kaj diversaj mezaj kaj urbaj lernejoj klarigis sin pretaj, instrui Esperanton."

Tiu ĉi pruvo de la intereso de komerca ĉambro de unu el la plej grandaj industri-kaj komerc-urboj de Germanio estas tre grava kaj denove gajnos por ni multajn ĝisnunindiferentajn komercistojn.

## Komercio.

La komercaj kursoj de Limoges (Franc.) decidis, fari kurson de Esperanto. La komerca ĉambro aprobis tion en sia poresperanta decido de 4. nov.

## Scienco.

La Anato-mo-Klinika Societo de Bordeaux decidis unuvoĉe en sia kunveno de 21. nov. aliĝi al la poresperanta decido de la Franca Asocio por la Progreso de Sciencoj. Tion ni ŝuldas al nia varma subtenanto, s-o Bergonié, profesoro de la medicina fakultato en la universitato de Bordeaux.

### En la Lille'a Universitato

s-o prof. Vanverts, dekano de la medicina fakultato kaj korespondanta membro de la medicina akademio (nova prez. de TEKA) multe propagandas nun Esperanton per artikoloj en medicinaj ĵurnaloj.

La Ŝtata Saksa Esperanto-Instituto, kies atestojn GEA akceptas kiel oficialajn, konstituls Ekzamenan Komisionon por la regiono de Essen. La komisiono estas kompetenta por ekzamenoj ĉiugradaj laŭ la regularo de la nomita instituto. Adreso: Essen, Ortrudstr. 48.

## Laboristaro.

### En Greco Milanese (Italio)

fondiĝis nova laborista grupo kun 35 membroj sub honora prezidanteco de da urbestro.

### En Latvio,

kie pro la manko de lernolibroj post la milito nia movado nur tre malmulte povis progresi. Esperanto nun denove vivas. Grupoj aŭ kursoj ekzistas en Riga (2), Aluksine kaj Jelgava. Speĉiala komisiono intencas eldoni vortarojn.

## Amasa propagando en Teŝen'a Silezio.

S-ano prof. L. Kronenberg el Bydgoszcz, invitive de la ĉi tiea laborista partio, gvidas sukcesplene kursojn en la tuta teritorio. En-

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 8-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja. (44-a daŭrigo.)

La junulo frapetis lin je la ŝultro. La Loziŝĉano vidis, ke ĉi tiuj facilanimaj junuloj zorgas pri li, kvankam lin mirigis la por li nekomprenebla gajeco, kun kiu ili traktis lian malgajan situacion. Kio ajn estis, vespere li, tute alformiĝinta, obeeme sekvis la junulojn al la stacidomo. Tie oni prenis lian monon, oni pagis kiom estis necese kaj la reston (ne tre multe) oni donis al li knne kun la bileto, kiun oni enŝovis post la rubando de lia ĉapelo. Antaŭ la forveturo la atikreska junulo alportis du botelojn da cidro, grandan bulkon kaj fruktojn, ĉio bone enkorbigita. Tio ĉi treege korusiĝis Mateon, kaj li adiaŭante forte ĉirkaŭprenis sian bonfaranton.

"Vi estas por mi kvazaŭ parenco", diris Mateo. "Neniam mi vin forgesos!"

La junulo frapis lin je la ŝultro, kaj la tuta societo, adiaŭante lin per gajaj kapmovoj kaj per ridado, poste sekvis per la okuloj la vagonaron, kiu veturigis Mateon tra tuneloj, stratoj, remparoj, kelkloke eĉ trans tegmentoj, ĉiam malgaje kaj egalmezure tintante. Dum kelke da tempo ankoraŭ en la fenestroj de la vagono jen aperadis jen malaperadis la domoj de la malbenita urbeĝo, poste vidigis akvo ĉe la rando de la fervoja surŝutajo, poste tre niĝis verdaj montoj kun vilaoj, ĉirkaŭitaj de arboj, verdaj insuloj sur grandega rivero, blua ĉielo, nubetoj, — poste la plena luno tial same kiel hieraŭ apud la maro levigis kaj pendis en blua nebulo super la glata ebenaĵo de la rivero.

skribiĝis 1700 personoj, el kiuj granda parto pro subita mobilizado devis foriri por militservi. Regule nun partoprenas la kursojn en Trzyniec 140 personoj, en Stonava 70, Karwina 90 personoj. Krom tio kursoj en Mor. Ostrava, Darkow, Wedrzna kaj Dabrowa. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj estas laboristoj. Dank' al tiu propagando la direkto de l' fervojo Košice-Bohumín rekomendis oficiale al siaj oficistoj la lernadon de Esperanto. S-o Juszczyński, pola konsulo en Bohumin, estas esperantisto. Dum la lastaj kvar semajnoj oni disvendis 1500 esp. lernolibrojn.

"Robotnik Slaski" aperigas longajn artikolojn pri Esperanto. Oni jam preparas novajn kursojn, kiuj komenciĝos en marto de venonta jaro samtempe en 30 diversaj urboj kaj urbetoj de Teŝen'a Silezio. (Pola Esp. Servo.)

(Rim. de Red.: Teŝen'a Silezio estas teritorio apartenanta al Ĉeĥoslovakio.)

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

### "Belga Esperantisto"

raportas en sia numero de sept.-oktobro pri nova esp. grupo de socialistoj "Nia Ideo" en Antwerpen. Kursoj funkcias en jenaj lokoj: Antwerpen (5 kursoj kun entute 150 p. ĉe "Verda Stelo", gvidataj de s-o Frans Schoofs; 3 kursoj ĉe Antwerpena Junularo), Bruxelles (kursoj en St. Gilles), Gent (po 1 kurso por flandra-kaj francalingvanoj), Ledeborg (2 kursoj oficiale subvenciataj de la komunumo); Mehleno (novaj kursoj en urba lernejo), Verviers (3 kursoj), Ougrée kaj Sclessin. Preskaŭ ĉiuj gazetoj en la lando notis la komunikojn pri la deziresprimoj de la franca kaj itala asocioj por la progreso de la sciencoj kaj pri la decido de la Ligo de Nacioj.

### Esperanto-Tago en Verviers (Belg.)

Dimanĉon la 8. jan. 1922 (tago de la Reĝoj), la Esperantista Grupo de Verviers organizos "Esperanto-tagon" en sia urbo. La Spa, Liège kaj Sclessin'aj societoj partoprenos ĝin. Bankedo demokrata, vizito de muzeo, ĝenerala kunveno labora, festo kun teatraĵoj kaj fina dancado. Alirbaj kaj alilandaj samideanoj estas tutkore invitataj. Okazos ankaŭ ekspozicio de esperant-ajoj, por kiu la alsendo de dokumentoj ĉiuspecaj estas antaŭdanke dezirata.

### "The British Esperantist"

de decembro scilgas pri nova esp. grupo ĉe YMCA en Leicester, kaj pri novaj kursoj en Bradford (30 p.), Bournemouth (3 kursoj, ĉ. 75 p.), Coventry, Haifield (20knaboj), Liverpool (poŝtistoj), Warrington (12 personoj).

### ET en Hago.

En Hago ET nun estas poekzemplere aĉetebla ĉe la kioskoj de la firma A. W. Segber's Uitgevers M-y, administratore Oranjeplein 67.

### El Germanio.

En la popola alturneĝo de Hagen i. W. s-o ĉefredaktoro Hartenfels faris paroladon, post kiu fondiĝis kurso de 50 partoprenantoj. — En Schwerte okazis Esperanta ekspozicio kun parolado de s-o Hartenfels el Hagen. Novan kurson kun 25 lernantoj gvidos s-o fervoja inspektoro Bierhoff.

### Esperanto en Bari (Ital.)

Esperanto nun multe progresas speciale inter la lernantoj de la Komerca Universitato. Oni fondis Universitatan Esperantistan Grupon. — Alia kurso komencis la 19. nov. ĉe la "Accademia Balcanica" sub la gvido de prof. A. Lacalendola. — La monata ĵurnalo "Corriere Balcanico Esperantista", organo de tiu-ĉi Asocio, skribas pri Esperanto kaj disvastigas ĝin inter la provincoj de Bari, Joggia kaj Lecce.

La korbo kun provizo kliniĝis en la manoj de la malfortliĝinta viro, sidanta en angulo de la vagono, piroj el ĝi elglitis sur la plankon. La plej proksima najbaro ilin levis, delikate prenis la korbon el la manoj de la dormanto kaj metis ĝin apud li. Poste eniris konduktoro, prenis, ne vekante Mateon, la bileton el post la rubando de lia ĉapelo kaj anstataŭigis ĝin per blanka peco da kartono kun cifero. La giganta viro profunde dormis sidante; malgajaj konvulsietoj trakuris lian vizaĝon, kaj de tempo al tempo liaj lipoj kuntiriĝis kvazaŭ pro timo.

Dume la vagonaro flugis, kaj la tintado, egalmezura, malgaja, resonadis jen en dormantaj intermontoj, jen en valo, jen en strato de malgranda urbeto, jen en stacioj, kie la reloj interkruciĝas kiel aranĉoj, kie, bruante kiel ventego, ĉiam novaj kaj novaj vagonaroj trakuras laŭ ĉiuj direktoj, kun sama tintado egalmezura, malgaja.

### XXVII.

En postsekvantaj jaroj Mateo havis la okazon veturi per la sama vojo, sed tiam ĉio en Ameriko aspektis por li jam tute alie, ol en tiuj malgajaj tagoj, kiam la vagonaro forflugigis lin el Nov-Jorko, — li ne sciis, kien. Li tradormis la mirindajn bordojn de Hudson-rivero, vekigis por mallonga tempo nur en Sirakuse, kie la fenestroj de l' vagono eklumiĝis de ekstere per terura ruĝa fajro. Tie estas grandegaj ferfandetoj. La fandita fero kiel fajra lago kuŝis sur la tero, ĉirkaŭe staris nigraj konstruaĵoj, nigraj viroj vagadis kiel demonoj, nigra fumo perdiĝis en la nigra nebulita ĉielo, kaj sonoriloj senĉese sonoris meze de l' nokto, unutone, maltrankvile. Poste Buffalo ankaŭ en nebulo kaj fumo. Poste, jam ĉe tagiĝo, oni komencis rapide malfermi fenestrojn en la vagonoj, enpenetris freŝa matena aero, la amerikanoj elŝoviĝis el la fenestroj, rigardante ien kun videbla scivolo.

## Esperanto en Pola lando.

En Turek' fondiĝis "Pola Esp. Informejo", gvidantoj B. Strelczyk kaj E. Henkel. Adreso: Turek, ul. 3-go Maja 10. La 27. nov. okazis jarkunveno de grupo "Esperanto", kiu de nun nomiĝos "Nova Vivo". — En Przedecz apud Wloclawek post klopodoj de s-o E. Henkel stariĝis esp. rondo "Novaj Vojoj". — En Kolo kaj Sompolno s-o Strelczyk el Turek gvidos kursojn. — En Kalisz fervore propagandas s-o Jakob Lustig, u. Ziota 19. (PEI.)

### En Szeged, Hungario

malfermiĝis kurso por 41 personoj en la edukejo por instruistoj.

## Diversajloj.

### Trovo de la plej riĉa karba regiono.

(El Petrograda gazeto "Maŭovik" ["Movanta rado"], n-o 111. 11. Junio 1921.)

En Siberio, en Kuznecka baseno troviĝas en la tero 15 trilionoj pudoj\*) da karbo.

Tiu ĉi provizo estas 1 1/3-oble pli granda ol la provizo de unu el la plej karboriĉaj landoj, Anglulo, kaj 15-oble pli granda ol la provizo de nia Dona baseno, kiu provizis tutan Rusujon je karbo.

Se oni ekspluatus el ĝi ĉiujare tiom da karbo, kiom oni en antaŭmilita tempo ekspluatis en tuta Rusujo, t. e. du miliardojn da pudoj, la provizo de la Kuznecka baseno sufiĉus por 7500 jaroj.

Ĉar oni akiras en la tuta mondo ĉiujare 60 miliardojn da pudoj, la baseno — post plena ekspluato de la minejoj de ĉiuj landoj — povus provizi la tutan mondon dum 250 jaroj.

En Telbeska regiono troviĝas ne malpli multe ol 900 miliardoj da pudoj, t. e. tiu ĉi regiono povus provizi Rusujon laŭ normo de antaŭmilita tempo dum 1500 jaroj kaj la tutan mondon dum 100 jaroj.

Translokigita en regionon de Kuznecka baseno labora armeo jam komencis prepari laboron por gajni la karbon, kies tavoloj atingas kelkloke la supraĵon de la tero.

(Tradukis G. T.)

\*) 1 pudo = 16 kilogramoj.

### La plej maljuna homo.

Djouro Chemdine, la plej maljuna homo en la mondo, ĵus alvenis Parizon. Li estas turko. Naskiĝinte en 1778, li nun estas 146-jara. Okaze de lia sepa edziĝo antaŭ nelonge francaj gazetoj publikigis lian portreton. Al ĵurnalistoj li diris, ke li venis Parizon por perlabori sian vivon. Supoze li direktoro de teatro aŭ kinematografata teatro dungos lin por prezenti al la publiko la respektindan blankbarban maljunulon.

Trad. S. Franĝ, Paris.

## Gazetaro.

La Revue Contemporaine, Paris, nov. (Granda 8-paĝa artikolo "Esperanto kaj la lukto de lingvoj".)

La Revue du Touring-Club, Paris, nov. (Esperanto kaj Ligo de Nacioj.)

Echos de l'Exportation, 30. nov. (Esp. kaj la Pariza Folro kaj la decido de la komerca ĉambro de Limoges.)

Mer et Colonies, organo de la franca mara kaj kolonia ligo (pli ol 500000 membroj), 28. 11. (Internacia lingvo por la marino, de s-o Rollet de l'Isle, kun lia portreto.)

La Caravane, Gaillac-sur-Tarn, Franc., nov. Kun avizo en Esperanto.

Norsk Bokbinder Tidende, Kristiania, 1. 12. (Artikolo en Esperanto.)

Neue Schweizer Zeitung, Zürich, 10. 11. (Propaganda artikolo.) — 29. 10. (Esperanto kiel diplomata lingvo.)

Gazetta di Siracusa, Italio, 6. 11. (Sukcesoj de Esperanto.)

Humanitas, Bari, Italio, 6. 11. (Tutpaĝa artikolo pri Esp.)

"Niagara, Niagara", vokis la konduktoro, rapide trairante la vagonojn kaj tuŝis Mateon je maniko, kun miro rigardante homon, kiu sola sidas en sia angulo kaj ne admiras la Niagara'n. Mateo levigis kaj elrigardis tra la fenestro. Estis ankoraŭ malmulte, la vagonaro iel timeme surgrimpis grandan ponton, pendantan super la profunde malsupre bolanta rapida rivero. La ponto tremis sub la ŝarĝo, kiel forte streĉita kordo. Alia simila pontego, je granda alteco jeita de unu bordo sur la alian, aspektis en la nebulo kiel maldika strieto de diafana puntaĵo. Malsupre bruidis la ŝaŭmanta rivero; el sub la rokoj, sur kiuj dormetis la domoj de la urbeto, akvo falis malsupren en formo de blankaj rubandoj. Pli malproksime la ŝaŭmo de la rivero kunfluis kun la blanketa nebulo, kiu ondiĝis kaj flikiĝis kvazaŭ en giganta kaldrono, kaŝante de l' vido la pejzaĝon de la akvofalo. Nur obtuza bruegado, senlaca, senŝanĝa, kvazaŭ senespera, regis tie, tremetigante la malsekan, malluman aeron. En nebulo kvazaŭ sin movadis kaj brubolis la grandega, malsonore ĝemante kaj plendante pro tio, ke de jarcento al jarcento ĝi ne trovas por si ripozon.

La vagonaro ĉiam timeme rampis super la abismo, la ponto ĉiam streĉiĝis kaj tremetis, la nebulo flikiĝis, kiel fumo de grandega brulo

Rinascita, Napoli, Italio, 19. 11. (Artikolo.)

Kaja, Tallinn, Est., 19. 8. (Raporto pri la XIII-a) Corriele do Ceará, Fortaleza, Braz., 8. 10. (Raporto pri la XIII-a.)

Grazer Volksblatt, Graz, Aŭstrio. (Diversaj artikoloj.)

Kärntner Tagespost, Villach, Karintio, 1. 12. (Traduko de Letero el Latvio laŭ ET.)

Bremer Nachrichten, Bremen, Germ., 30. 11. (Artikolo pri Esperanto en Nordameriko.)

## La hodiaŭa numero de ET

aperas kiel speciala numero por la Leipzig'a Foiro en plialtigata eldonombro kaj estas reklamacele sendota al multaj komercaj ĉambroj, firmoj ktp. de la tuta mondo. Legantoj, kiuj deziras ricevi senpage plurajn ekzemplerojn de tiu ĉi numero por reklami ĉe gravaj firmoj de sia loko, bonvolu sin turni al la administrarejo de ET.

Je Kristnasko aperos dua numero por „Esperanta Ligo", la gazeto de la esperantista geblundularo. En tiu numero ni ne impresos anoncojn, por rekomenci niajn abonantojn pro la iom malgranda literatura enhavo de la hodiaŭa numero.

## La ŝtono en puto.

En iun puton mia ŝtono falis.  
Profunden mi senmovan fiksis vidon:  
La nigra fendon griza spir' vualis,  
La faŭko spulis malbongustan ridon.

Satano, ĉu vi fakte sidas sube  
Kaj sendas veziketojn al aero?  
Parolon mian aŭdas vi sendube,  
Ne kredu, ke mi timas pro l' infero!

Vi ŝprucu, siblu, bleku kaj murmuru: —  
Mi ridas vian kontraŭlegan buŝon.  
Ne pensaru, ke mi vin forkuru,  
Ŝtoneto al vi donos nazopuŝon.

Ŝtoneton novan jetis mi mokante,  
Plumbplumbe plaudis akvo en mallumo.  
Ĝi tremis rule, siblis levigante,  
Kaj el ia fendo svelis naŭza fumo.

Mi balanciĝis. Mia kor' ekhaltis.  
La spiro peze en la brust' batalis.  
Fleksiĝis teren mi, jen alten saltis,  
Kaj ĉio ĉirkaŭ mi abismen fallis. —

La puto estis — truo en ĉielo,  
Sur alta fundo brilis mia ŝtono.  
Mi kredas, ke ĝi estas bela stelo,  
Desegno brila sur malhelo fono.

N. Barthelmess.

## Recenzo.

### LIBROJ.

ELEKTITAJ VERSAĴOJ. De K. D. Belmont. El rusa lingvo tradukita N. V. Nekrasov. Eldono de Persona Esp. Soc. 1921. 11:17 cm. 8 pĝ. kaj kovrilo. Havebla ĉe Esp. Lit. Asocio, rusa sekcio, Moskvo, B. Dmitrova, 12, al M. Valentinov.

MONDO KAJ KORO. Poemoj de K. de Kalocsay. Budapest 1921. 11:14 1/2 cm. 59 pĝ. kaj kovrilo. Havebla ĉe Paolo Balkanyi, Budapest VI, Hajos utca 18-11-2, Hungario. Prezo: 25 cts. av., 40 cts. fr., 5,50 gmk., 4 pencoj, 0,07 dol. kip.

Mortis Grabowski, sed jam liajn postsignojn eniris aliaj talentuloj, kaj la esp. poezio floras plue. En modesta sed plaĉa kajereto ĵus aperis kolekto de 24 poemoj de la hungaro Kalocsay. Kelkaj el ili jam aperis en ET aŭ aliaj esp. gazetoj. Nur pro manko de loko ni ne dediĉas al la verketo detalan recenzon, kiun ĝi certe meritas. Ni nur diras, ke la melodial versoj, la belsonaj rimoj kaj aliteraciaj ŝajloj la orejon kaj koron de ĉiu esperantisto amanta sian karan lingvon, same kiel ili raviis la partoprenintojn de la poiskongreso en Budapest. Ni esperas, ke la poemoj de K. baldaŭ aperos en pli granda kolekto kaj en vere inda formo. (R-ano.)

kaj, levigante al la ĉielo, tie kunfluis kun ĉeno da altaj nubetoj. Poste la vagonaro ekkuris pli trankvile, sub la radoj sentiĝis jam firma tero, la ponto finiĝis, kaj la vagonaro plirapidigis sian kuradon laŭlonge de la rivero. Tiam subite fariĝis pli lume; el post la nubeto, kiu pendis super la grandioza akvofalo, mallaŭtigante ĝian bruegaden, elrigardis la luno; la akvofalo restis malantaŭe, kaj super la akvofalo ĉiam ankoraŭ staris nebula nubeto, kuniganta ĉielon kaj teron... Ŝajne ia flughava monstro sin kuŝigis en tiu loko sur la riveregon kaj alsciigis al ĝi meze de la nokto, kaj muĝegas, kaj fosas, kaj brubolas

Mateo rimarkis Detroit'on nur tial, ke la vagonaro en sia tuteco sin apartigis de la tero kaj suriris la relojn, kiuj ŝajne naĝis sur akvo. Tio okazis jam en la dua nokto. Sur la alta riverbordo grandan spacon okupis la urbeĝo kun siaj bluaĵ, blankaj, flavaĵ fajroj. Matene la vagonaro preterflugis Chicago'n. Dekstre la relojn preskaŭ tuŝis la bluaĵ ondoj de Michigan, kiel maro vasta, sur kiu granda kaj strangan aspekta vaporsipo naĝis el post la akva horizonto, kvazaŭ supernitante akvan monton. Ankoraŭ dum kelke da horoj oni veturis laŭlonge de la bordo, sed post Milwaukee la vojo direktis okcidenten. (Daŭrigota.)

Lastahore ricevita Telegramo el Helsingforso:  
Parlamento ree donis 2500 Fmk. por 1922.  
Esp. Asocio por Finnlando.



# LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO

POR TEKNIKO KAJ KONSTRUKO

Printempa Foiro 1922 de la 5-a ĝis 11-a de marto

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27-a de aŭgusto ĝis 2-a de septembro

La centra merkato por la internacia komerco kaj ofertado

Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN

IN LEIPZIG

(Foiraĵejo por la Specimenfoiro en Leipzig)

VERBODEN TOEGANG VOOR  
BESOUWERS VAN DE  
BANKEN EN DE  
WISSELBANKEN

## Korespondantoj, atentui!

Ĉiu el vi havas, kiel mi scias laŭ propra sperto, la deziron posedi fotografiojn de sia korespondanto aŭ -ino. Sed la kutimaj fotoj estas hodiaŭ tro multekostaj por tiu ĉi celo. Mi povas al vi liveri por la interŝanĝo tre malmultekostajn

belajn vizitkartojn kun via fotografiaĵo.

Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 85 germ. mk., ĉiu plia linio de teksto kostas 2 mk. pli; por sendkostoj aldonu koncernan sumeton. Formato 95:45 mm. Fotoj laŭ ĉiu ĉiun fotografio, kiu estos resendata sendifekte. Livertempo minimume 4 semajnoj. Alsendo per rekomendita letero.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.

## Nederlanda Esperanta Komerco- Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)  
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)



Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin bargas per la dissendo de cirkuleroj.

Prokuras komercajn adresojn.

Prizorgas la anoncadon en Nederlando.

Interrilatiĝas kun nederlandaj komercistoj kaj industrilatoj.

Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

## Anoncetoj.

**MORTO.** Nome de nia grupo mi scias, ke nia kara prezidanto kaj vicdelegito de UEA, s-o Klemens Mathias Müller, mortis la 29. 11. 21, posttagmeze je 5 h., post longa malsano. La enterigo okazis la 1. 12. 21. Kiu konsilas noblan karakteron, konservos al li ĉiaman memoron. En profunda funebro: por niaj gegrupanoj kaj gekursanoj: F. Mayerhauser, Bad Reichenhall, Bavario.

**PROTESTO.** Mi publike protestas kontraŭ la misuzo de mia nomo kaj adreso aperintaj en la gazeto „Esperantida“. Mi ĉiam estis kaj plue restos fidela al nia kara afero: Esperanto. Alojzy Smura, Bydgoszcz, Podolaka 20, Pol.

**ATENTUI!** Ĉiujn demandojn, mendojn kaj sendaĵojn direktu nur al sekvanta preciza adreso (ne forgesu mencii la nomon de la gvidanto): Pola Esperanto Servo, s-o Francisko Pregel, Bydgoszcz, Kordeckiego 1a, Pol.

**ARTPENTRISTO** Georgo Bohutinsky, Praha II, Ĉeĥoslovakio, Palackého nabreží 1672-86 n, pentras per plumo sur koloraj paperkartoj aŭ per karbo motivojn de Praha (kongresejo), kasteloj, ruinoj de Ĉeĥoslovakio. Ankaŭ li faras pentraĵojn laŭ fotografitaj pejzaĝoj el diversaj landoj. Pli grandigas portretojn laŭdezire. Moderaĵ prezoj. Peti informojn: — Kiu povas havigi al mi vidajkartojn aŭ fotografaĵojn de la kongresejo de la XIV-a en Helsinko aŭ fotografaĵojn de la kongresejo per plumo aŭ karbo?

**ITALA LINGVO.** Esperantistoj, kiuj scipovas aŭ lernas italan lingvon, abonu kaj legu la novan revuon ilustritan semajnan „RINASCITA“ („Renaskiĝo“), bonege amuza kaj instrua, kun propaganda rubriko por Esperanto. Skribu: „Rinascita“, Via Avvocata a Piazza Dante 25-27, Napoli; aŭ al P. Cesarini, del. UEA, Potenza.

**LITERATURO.** La verkojn de Schiller, Goethe, Shakespeare, Heine, Körner, Lessing, Uhland kaj Chamisso (belege bindaĵoj) deziras vendi s-o Schneider, Leipzig, Germ., Pfaffendorfer Str. 30, III.

**NEPRE** ĉiu devas legi la jusan aperintajn originalajn poemojn de d-ro K. de Kelocsy (kolekto „Mondo kaj Koro“), kiuj estas brila pruvo pri la literatura kapableco de nia lingvo. Prezo: unu resp.-kup. — Por la nama prezo „Ses Noveloj“ kaj „Bonhumoraĵo Rakontoj“. Mendo ĉe Paŭlo Balkanyi, Budapest VI, Hajos utca 15.

**ESP. EKSPOZICIO.** Fritz Michalek, Reichenberg, Lerchenfeldstr. 20, Ĉeĥoslovakio, kolektas kaj interŝanĝas por konstanta esp. ekspozicio ĉiuspecajn esperantojn, propagandilojn ktp.

## Komercedoj, Komercestoj, Reprezentantoj

uzu en via propra intereso la servojn de la

Komercesta Esperanto Grupo  
Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14

kiu havas bonegajn rektajn rilatojn al gravaj germanaj firmoj kaj fabrikoj.  
Perado senkoste!


## Libra kaj Arta Presejo Emil Friedr. Adolph

Fond. 1888. Hassloch (Palatinato) Telef. 38

Fabrikado de bonkvalitaj artpresaj prospektoj kaj de ĉiaj presaĵoj por komerco kaj industrio en ĉiuj eŭropaj lingvoj, inkluzive Rusa kaj Esperanta

Oni petu oferton.

Korespondado: Esperante, Angle, Franco, Germane ktp.



aus. Architectus Kaslen III

Pedagogie valora novaĵo por geknaboj estas niaj

## „ARCHITECTUS“

Ludiloj por kunmeti kaj konstrui.

Facile kompreneblaj, distraj kaj instruaj.

Niaj malaltaj prezoj prezentas grandan profitoblon.

## Freiburger

Spielwarenfabrik (Ludilfabriko)

Freiburg i. Br. G. m. b. H. (Germanio.)

Eksporto ĉiulanden. Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

## SILKAJ BRODAĴOJ

REKTE EL ĤINUJO, LA SILKOLANDO!

Esperanto-brodaĵo kun surskriboj esperantaj, verda stelo, globo ktp.

Biblaj brodaĵoj kun sanktaj tekstoj.  
15:20 aŭ 29:39 cm ĉ dol. 2.50 aŭ 4.50.

Brodaĵoj de birdoj, floroj, vidaĵoj ktp. samformataj kaj samprezaj.

Specialaj laboroj laŭ modelo.

Sendo per rekomendita letero.

Dol. 1.00 = 10 stamp. respond.-kup. aŭ 3 ŝilingoj, poŝtmandatoj aŭ kambioj de Thos. Cook & Son.

Specimeno kontraŭ 1 resp.-kup.

C. S. Gee,

HAI-YEN (tra Shanghai), Ĥinujo.

Korespondado en Esperanto!

## Babcock-Wilcox Akvoĉuboj-Kaldronoj

por normala kaj tre alta vaporigo estas fabrikataj de

## FRATOJ STORK & K-to HENGELO (O) NEDERLANDO

Fabriko kun pli ol 2000 laboristoj.

Esperanto korespondanta.

Nur petoj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.

## Korespondo kaj Interŝanĝo.

F-ilo Giolla Giuseppe, Via Ponte Seveso 50, Milano, Italio, deziras korespondi kaj interŝanĝi per poŝtmarkoj, poŝtkartoj (bildblanke), leteroj, portretoj, papermono kaj ĉio.

F-ino Adele Lindfors, Finnlando, Wilpuril, Kirkko-saarekatu 6, as 25, Interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.

Haapsalu, Estonio, J. Grünthal, pk. 15, deziras korespondi letere kun spertaj gvidantoj de esperantaj kuroj pri pli intensa kaj interesa instrumentaro.

Haapsalu, Estonio, s-o J. Rand, Kalda 51, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj.

S-o Emil Elstner, Grottau 425, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝas esp. gazetojn kun ĉiuj landoj, esceptite Germanio.

S-o Edmund Feitke, Bydgoszcz, Petersstr. 11, Pol., deziras korespondi kun japanoj kaj ĉinanoj per poŝtkartoj ilustr.

S-o Martil Turunen, Vilpuril, Finnlando, Pontusk. 1, Interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

S-o Erich Llier, Helmstedt, Henkestr. 56, Germanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj multkoloraj kun ĉiuj landoj.

35 fervore lernantaj geknaboj (11-15 j.) serĉas samaĝajn gekorespondemulojn. Ilustr. poŝtkartoj al instr. Friebe, popola lernejo Dresden-Dobritz, Germanlando.

S-o Jones, 9 Hurry St., kaj s-o Williams, 27 Peel St., Dingle, Liverpool, Anglujo, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, leterojn, poŝtmarkojn kaj fotografaĵojn kun ĉiulandaj samideanoj.

Kiu sendos al mi 50-40 diversajn stamp. poŝtmarkojn de sia lando, ricevos saman kvanton da rusaj poŝtmarkoj. Aleksandro Dmitrijev, Baranovskaja 28, Velikije-Luki, Rusio.

Adolf Wiesner, Wiesdorf apud Köln, Kölnerstr. 281, Germ., deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj kun la tuta mondo; ankaŭ interŝanĝas gazetojn.

Fraŭlo Robert Hansel, 22-jara, Wiesdorf apud Köln, Schiebsbergstr. 54, Germ., deziras korespondadi kun la tuta mondo per poŝtkartojn ilustritaj kaj leteroj, nur kun fraŭlinoj.

S-o Angelo Chisté, Laŝino, Trentino, Italio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj leterojn kun ĉiuj landoj. Li korespondas volonte esperante, itale, germane kaj france.

Pal Dinda, II, Telekhaz g. 5, Temeavur, Rumanio, Interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

Kiam troviĝos sufiĉaj abonantoj, aperos malgranda revuo

## La Mondo Politika.

Jara abonkosto 3/6 ŝil., t. e. 14 resp.-kup. Ne sendu monon tuj, sed anoncu vin kiel abonanto. Oni invitas artikolojn nepagotajn. Bonvolu enmeti kuponon, se neceso respondo.

Redaktoro,

4 Princeton St., London W. C. 1.

## Abonejoj de ET

en la landoj

Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.

Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.

Ĉeĥoslovaka: Otto Šklenčka, Hradec Králové.

Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.

Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.

Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Cléry, Paris 9.

(Abonprezo: 0,45 fr. X numero da dezirataj alsekvaj numeroj.)

Hispana: Konrado Doménech, Ĝerono, Rambla Alvarez 12-2.

Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 18-11-2, Budapest VI.

Litova: Paŭlo v. Medem, Smeltu g-vje 12, Kaunas (Kovno).

Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Pregel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esperanto Centro, Targul-Mures.

Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.

U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

## La plej bela donaco por Kristnasko.

Sinjoro	Sinjorino
Amiko	Amikino
Frato	al
Fianĉino	Fianĉo
Edzino	Edzo:

SEMPERA VENDADO de fabrikanto al uzanto aperigas al vi 1/4 de la prezo de aĉetataj objektoj. Ĉu vi deziras sekvi la parizan modon? Se jes, aĉetu belartajn kaj originalajn esperantajn insignojn. Sinjoroj, mendo rubandan pendaĵon por poŝtfolio kun verda stelo el galalito, la rando emajlita. Sinjorinoj, mendo juvelpendaĵon kun rubando aŭ perloj (laŭ elekto) kaj verda stelo el galalito. Prezo por ĉiu dek frankoj en rekomendita sendaĵo. La nemunita pendaĵo kvin frankoj. Grandecoj: 0,025 kaj 0,040. La firmo vendas egale ĉiujn parizajn artikolojn de propra arta kreado. Detalaj klarigoj kontraŭ respond-kupono. Ĉiuj mendoj estas akurate prizorgataj. Skribu al: Atelier Esperanto (direktorino fraŭlino Gérard, vic-del. de UEA), 9, rue d'Armailié, Paris 17.

## VITRO-PENTREJO

Emil Weiler, Freiburg i. Br.  
Emmendingerstr. 30 \* (Germ.)

Speciala Laborejo

por unuakvilitaj pentritaj fenestro-bildoj en belegaj koloroj sur brunlita vitro.

Arta fabrikado garantata.

Profanaj kaj religiaj motivoj ĉiuspecaj.

Tuja livero. Bildspecimenoj kaj prezoj laŭ deziro.

Reprezentantoj serĉataj en ĉiuj landoj.

Lernantinoj de 8-a gimnasia klaso deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj kun junaj fraŭlinoj de ĉiuj landoj, precipe kun samaĝaj lernantinoj. La dezirantoj scigu sian adreson al la lektoro P. A. Kolev, Regentka 19, Sofia, Bulgario. — Klarigo: 8-a gimnasia klaso estas laŭvice la 10-a jaro de studado en lernejoj.

S-o Frant. Balicek, instruisto, Cerveny Kostelec, Ĉeĥoslovakio, interŝanĝas poŝtkartojn, leterojn, poŝtmarkojn, monojn kaj lernantulojn desegnaĵojn precipe kun eksteruloj instruistoj.

S-o Ladislao Spiro, Miskolcz, Reményi utca 7, Hungario, deziras serioze interkorespondi kun plianudantoj kaj komponist-studentoj de l'Académie Nationale de Musique, Paris, franclingve, ankaŭ kun perfektuloj, pri muziko, belartoj per leteroj, poŝtkartoj ilustr. esperante.

F-ino Rozsi Auerbach, Miskolcz, Szeles utca 1, Hungario, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun ĉiulandaj samideanoj.

S-o Alfred Klein, Miskolcz, Dayka Gabor utca 1, Hungario, deziras korespondi kun seriozaj samideanoj kaj turistoj. Interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn.

S-o Marcell Lichtner, Miskolcz, Szemere utca 99, Hungario, deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun ĉiulandaj samideanoj.

S-o Jenő Rosenthal, Miskolcz, Scéchenyi utca 105, Hungario, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.) kun ĉiulandaj samideanoj kaj studentoj.

F-ino Muratovskaja, Siberio, Omsk, str. Počtavaja 21, deziras interkorespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj la gelnantoj de la esp. lernejo en Auerbach i. V., Germ. Ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn, gazetojn ktp. Adreso: Esperanto, Auerbach, Vogilando, Germ.

S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 94, Dresden-Dobritz, Germanlando, serĉas tutmondajn gekorespondemulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj pri ĉiu temo. prefere pedagogia; donas komercajn informojn

S-o Hermann Schmidt, Unteraltensburg 10, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondadi precipe nur kun fraŭlinoj pri laŭ tre interesantaj temoj.

S-o Oswald Wittig, Klausentor 5, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi, precipe kun fraŭlinoj, pri laŭ interesaj temoj.

F-ino Catalina Montaner, Danús 1-1, Palma de Mallorca, Hispanio, interŝanĝas ilustritajn gazetojn, poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn, korespondas esperante, france, angle kaj hispane.